

# Informilo de Novembro 2017

Numero 31, novembro 2017

## 24 oktobro: Tago de Unuiĝintaj Nacioj

**24 oktobro 2017.** La Tago de Unuiĝintaj Nacioj markas la datrevenon de la ekvalido en la jaro 1945 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Per ratifo de tiu fonda dokumento fare de la plimulto de ĝiaj subskribintoj, inkluzive de la kvin konstantaj membroj de la Sekureca Konsilio, Unuiĝintaj Nacioj oficiale ekestis.

Oni festas la 24-an de oktobro kiel la Tagon de Unuiĝintaj Nacioj jam de la jaro 1948. Universala Esperanto-Asocio gratulas la organizaĵon okaze de ĝia 72-a datreveno.

La Ĝenerala Sekretario de UN, s-ro António Guterres, sendis la jenan mesaĝon okaze de la ĉi-jara Tago de Unuiĝintaj Nacioj:

Nia mondo frontas multajn gravajn defiojn.

Vastiĝantaj konfliktoj kaj malegalecon.

Ekstreman veteron kaj mortigan maltoleremon.

Minacojn al sekureco – inkluzive nukleajn armilojn.

Ni havas la ilojn kaj riĉon por superi tiujn defiojn. Mankas nur la deziro.

La problemoj de la mondo transiras landlimojn.

Ni devas transiri niajn malakordojn por transformi nian estontecon.

Kiam ni atingos homajn rajtojn kaj homan dignon por ĉiuj personoj – ili konstruos pacan, daŭripovan kaj justan mondon.

Okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, “Ni la popoloj” faru el tiu vizio realon.

Thank you. Shokran. Xie Xie. Merci. Spasibo. Gracias. Obrigado.

António Guterres

## UN-Reprezentanto de UEA alparolis la tradukan servon de Unuiĝintaj Nacioj

**17 oktobro 2017.** Je invito de la direktoro de la Dokumentada Fako de UN, s-ino Cecilia Elizalde, la reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, d-ro Humphrey Tonkin, hodiaŭ prelegis ĉe la Tradukaj Servoj de UN pri “La Graveco de Lingvoj en la Tagordo de UN”. Lia prelego emfazis, ke la oficistoj de UN, ekster la lingvaj servoj, emas subtaksi la gravecon de lingvoj ne nur ene de la strukturoj de UN sed ankaŭ en la programo de internacia evoluigo. “Bedaŭrinde la lingvaj servoj de UN foje kompareblas kun la UN-sidejaj akvotuboj,” li asertis: “dum ili funkcias, neniu laŭdas la tubistojn; sed se ili misfunkcias, ĉiu plendas.” Li atentigis pri la fakto, ke lingvoj entute ne menciigis inter la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo, nek inter la 169 “celtabuloj” kiuj akompanas ilin.

Aliflanke, li notis, ke en UN kreskas la interesiĝo pri multlingvismo. En majo, rezolucio de la Ĝenerala Asembleo kreis novan Internacian Tagon de Tradukado, kiun oni festos ĉiujare la 30-an de septembro; kaj nova rezolucio pri multlingvismo, akceptita de la Ĝenerala Asembleo kaj baldaŭ aperonta en sia fina formo, emfazas la gravecon de dialogo – do ne nur unudirekta komunikado – en la daŭrigeblo de la agado de UN, kaj atentigas pri la valoro de scipovo kaj utiligo ankaŭ de lokaj lingvoj, aldone al la ses oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Asembleo.

Li same atentigis, ke lingva diskriminacio kaj ĝia forigo estas aferoj ne nur de identeco (oni ne diskriminaci kontraŭ homoj pro la lingvoj kiujn ili parolas, same kiel oni ne diskriminaci pri ilia haŭtkoloro aŭ sekso) sed, multe pli grave, aferoj de komunikado (oni ne uzu lingvojn kiujn la alparolatoj ne komprenas, sed serĉu lingvojn komunajn al ĉiuj, en kiuj plena kaj dudirekta komunikado povas okazi).

La menciita rezolucio pri multlingvismo proponas ankaŭ, ke oni inventaru la lingvajn kapablojn de la pli ol 40.000 dungitoj de UN, tiel ke oni utiligu pozitive la lingvajn rimedojn de la organizaĵo. “Lingva diverseco ne estas nur problemo,” diris Tonkin, “sed ankaŭ pozitiva afero.” “Ideale, UN trovu internajn solvojn al lingva komunikado kiuj estas samtempe justaj kaj efikaj, kaj eksterajn lingvajn kanalojn kiuj ebligu komunikadon kun la popoloj de la mondo en iliaj lingvoj, por efikigi aŭtentikan dialogon.”

D-ro Tonkin estis invitita kiel fakulo pri lingvaj demandoj – rekono samtempe de la rolo de UEA en la stimulado de serioza kaj realisma debato pri la lingva politiko de UN, kaj de nur flanka pritrakto de la pretendoj specife de Esperanto. Ĉi-lastata tamen okazis, precipe en la postprelega diskutado inter la trideko da partoprenantoj. Montriĝis ke inter tiuj personoj estis almenaŭ unu iama lernanto de Esperanto, kaj ke la fina rezulto de la kunveno estis nepre pozitiva ankaŭ por nia lingvo.

## Premio Italio Homaj Rajtoj 2017 aljuĝita al Itala Esperanto-Federacio

**18 oktobro 2017.** La asocio “Internacia Libera Gazetaro – FLIP” kaj la Itala Sekcio de Amnestio Internacia ĉiujare aljuĝas la premion italan por homaj rajtoj nomatan “tutmonda civilizo kaj homaj rajtoj” kaj dediĉitan al la memoro de la eksa vicprezidanto de FLIP, Antonio Russo, donis la premion (diplomon kaj pentraĵon) de 2017 al la Itala Esperanto-Federacio. Ĝi motivigis sian decidon per la jena deklaro:

- La Itala Esperanto-Federacio estis fondita en 1910. Ĝi estas oficiale agnoskita senprofitcela asocio de 1956.
- Ĝi partoprenas regule en la kampanjoj organizitaj de la monda asocio de esperantistoj por helpi esperantistojn, kiuj estas viktimoj de naturaj katastrofoj kaj de militoj en la diversaj regionoj de la mondo.
- Ĝi kontribuas al la kampanjo de Unesko “Serio Oriento-Okcidento” por diskonigi la literaturajn ĉefverkojn de la diversaj kulturoj eksterlanden; el la itala estis tradukitaj al Esperanto verkoj kiaj Dia Komedio de Dante, La Princo de Machiavelli, La Malemoj de Verga, La Gefianĉoj de Manzoni, Homa vivo de Ungaretti, la Kantoj de Leopardi, Myricae de Pascoli, kaj ankoraŭ aliaj.
- Oni proponas al la itala publiko ankaŭ kelkajn ĉefverkojn de la Esperanto-mondo, kiaj Modernaj Robinzonoj kaj Maskeradoj de Tivadar Soros, La Infana raso de William Auld, La Zamenhof-strato de Roman Dobrzynski kaj ankoraŭ aliaj.
- Inter la statutaj celoj de IEF oni legas: “...inspire de la idealoj de Esperanto, [IEF] aranĝas solidarecajn iniciatojn, kiuj celas antaŭenigi pli profundan kulturalan integriĝon inter homoj kaj popoloj kun malsamaj lingvoj”.
- Temas pri principoj kaj celoj komunaj al la premio “Homaj Rajtoj 2017” de la asocio FLIP kaj la itala sekcio de Amnestio Internacia, kiuj volas agnoski ĝian valoron kaj aparte mencias la prezidantaron de IEF, Michela Lipari.

En lastatempa ceremonio en Romo la premion akceptis, nome de Itala Esperanto-Federacio, ĝia menciita prezidantino, Michela Lipari.

## Unuiĝintaj Nacioj kaj tradukado

**30 septembro 2017.** La 24-an de majo ĉi-jare, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj aprobis ege signifan rezolucion rilate la uzadon de lingvoj en tiu organizaĵo. Tiu rezolucio estis direktita al tradukado. Ĝi laŭdis la profesion tradukadon: “Profesia tradukado, kiel fako kaj kiel arto, ludas gravan rolon en apogado de la celoj kaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kunigante la naciojn, faciligante dialogadon, interkomprenon kaj kunlaboron, kontribuante al evoluigo kaj la fortigo de monda paco kaj sekureco.”

La rezolucio, en siaj enkondukaj alineoj, aludis al la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kiuj, laŭ la rezolucio “rekonas, ke ĉiuj kulturoj kaj civilizoj povas kontribui al, kaj estas nemalhaveblaj povigantoj de, daŭripova evoluigo.”

Ĝi asertis, ke “respekto al la monda kultura kaj lingva diverseco estas esenca premiso de antaŭenigo, ene de Unuiĝintaj Nacioj, de la spirito de malfermiteco, egaleco kaj dialogado,” kaj ĝi rekonis “la rolon de multlingvismo ... kiel kernan valoron de la Organizaĵo, kaj ĝian praktikon kiel rimedon por antaŭenigi, protekti kaj konservi la diversecon de lingvoj kaj kulturoj tutmonde.”

Kaj, fine kaj ĉefe, ĝi deklaris la 30-an de septembro “Internacia Tradukada Tago,” kiam oni festu la rolon de tradukistoj kaj levu la publikan konscion pri la valoro de tradukado.

Universala Esperanto-Asocio, jam de jaroj, atentigas Unuiĝintajn Naciojn, ke ĝi ne donas sufiĉan atenton al lingva diverseco, malgraŭ sia oficiala lingva politiko difinanta la formalan lingvouzon ene de la organizaĵo mem. UN emas akcepti la helpon de tradukistoj kaj interpretistoj sen agnoski ilian gravecon. Ekster la organizaĵo, en sia rilato al mondaj problemoj, UN malofte levas la demandon pri lingva diverseco kiel faktoron en planado kaj realigo de programoj pri evoluigo: la ekspertoj faras siajn planojn pere de la grandaj lingvoj, precipe la angla, kaj supozas, ke apenaŭ necesas konsideri la fakton, ke la homoj al kiuj tiuj planoj ofte estas direktataj, nome la malriĉuloj kaj la simplaj homoj, ne povas efike reagi ĉar ili ne regas la lingvon de la planantoj. Nia Asocio, pere de siaj UN-reprezentantoj, daŭre emfazas tiun grandan lingvan fendon inter la planantoj kaj la planatoj.

La nova atento al tradukado estas do faktoro tre pozitiva en la evoluo de lingvaj demandoj ĉe UN. Esperantistoj eble asertos, ke, uzante Esperanton, oni povus solvi la tutan problemon alimaniere. Ili ne malpravas – sed ĝis UN rekonas la plenajn implicojn de lingva diverseco, ĝi ne venos al konsiderado de radikalaj solvoj. Nunmomente, Esperanto estas solvo kiu serĉas problemon: ĝis UN rekonas la problemon, ĝi ne venos al konsiderado de solvoj.

Helpe de la provoko de UEA, oni fondis antaŭ kelkaj jaroj la Studogrupon pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, en kiu membras pluraj fakuloj pri lingva politiko, inkluzive de esperantistoj. Tiu grupo estas forumo por pridiskuti lingvajn demandojn kaj konsciigi UN-funkciulojn pri la graveco de tiuj problemoj. Ni daŭre laboros tiucele, ĝis UN pli klare komprenos la dimensiojn de la problemoj.

Intertempe, ni festu ĉiujare, kune kun tiuj aliaj konsciantoj pri lingvaj diferencoj, la tradukistoj, la kreskon de konscio, flanke de UN, pri la lingva diverseco.

## Prelego Soros, 10 novembro, pritraktos Esperantan eldonadon

**15 oktobro 2017.** La finan prelegon en la prelegserio Tivadar Soros prezentos la eldonisto, direktoro de la eldonejo Mondial, Ulrich Becker (10 novembro). La prelego okazos ĉe City University of New York Graduate Center, 34-a strato kaj Kvina Avenuo, en la urbo New York.

La temo de la prelego de Ulrich Becker estos “Esperanto estas (ne) morta: Pri la daŭra fendo inter la percepto de Esperanto kiel lingvo sen kulturo kaj ĝiaj eksterordinaraj kulturaj atingoj.” Li aldonas: “Tra la historio de Esperanto, ĝiaj adeptoj devis fronti kritikon, ke ili disvastigas lingvon kiu ne kapablas evoluigi daŭripovan kulturon ĉar ĝiaj parolantoj ne estas etne aŭ kulture difinebla grupo, nek bazita en geografie unueca areo. La efektivaj kulturaj atingoj de Esperanto parolas tute alimaniere – rilate la grandan kulturan produktadon ene de la Esperanto-movado kaj la signifan kulturan efikon kiun Esperanto havas en la vasta mondo. La prelego donos atenton, interalie, al la kampo de eldonado en Esperanto.”

Ulrich Becker estas estro de la eldonejo Mondial, kiu specialistas pri libroj en kaj pri Esperanto kaj aperigas unu el la ĉefaj literaturaj revuoj de la movado. Li estas aŭtoro de prozo kaj poezio en Esperanto kaj la germana, estis kunfondinto de la Germana Societo pri Interlingvistiko GIL kaj laboris kiel administranto, organizanto kaj redaktoro en naciaj Esperanto-organizaĵoj.

La prelegserio honoras la memoron de Tivadar Soros, kies du verkoj en Esperanto, Modernaj Robinzonoj kaj Maskerado ĉirkaŭ la morto, priskribas liajn spertojn en respektive la Unua kaj Dua Mondmilitoj. La prelegoj, prezentitaj en la angla, prezentas la laboron de pluraj fakuloj el la regiono de Novjorko kiuj aktuale esploras pri Esperanto kaj planlingvoj.

## 39a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo

**31 oktobro 2017.** UEA tenas rilatojn kun UNESKO ek de 1954, kaj niaj delegitoj estas ĉiam tre aktivaj por informi la landajn delegitojn (ministrojn, ambasadorojn) aŭ simplajn oficistojn. En Parizo de la 30-a de oktobro ĝis la 14-a de novembro dekduo da esperantistoj el UEA, TEJO kaj ILLEI dividas inter si la taskojn: kontakto kun la delegacioj laŭ la lingvoj, kaj disdono de dokumentoj; interveno en la Komisiono pri Edukado pri la nepra rolo de la gepatra lingvo en alfabetigo kaj en la Komisiono pri Kulturo pri graveco de la lingvodiverseco por eviti kulturigon tra la lingvo de la plej potenca lando. Unuafoje, UEA ricevis la rajton alparoli la Plenon dum tri minutoj, la 6an de novembro fine de la mateno. Ĉar finas sian 8-jaran mandaton Irina Bokova, ne mankas al ŝi dankoj kaj komplimentoj pro ŝia mastrumado de UNESKO en kriza momento. Ŝia posteulo estas virino, eksministro pri kulturo de Francio, Audrey Azoulay. Ŝi devos fronti la defiojn de klimatsanĝiĝo, terorismo (eĉ se tie oni parolas pri perforta ekstremismo) kaj kulturdiverseco. UNESKO restas idelaboratorio kaj devos eviti politikigon. Malio dankis la engaĝiĝon pri rekonstruo de Tombuktu per moda prezento dum kantis kaj muzikis malia duopo. Ankaŭ nova kaj aprezata estis la intervjuo de la Nobelpremiito Lech Walesa prefere al longa parolado. Elektita kiel Prezidanto de la 39a Ĝenerala Konferenco estas virino el Maroko, s-ino Zohour Alaoui, kiu difinas sin kiel “virino, arabo kaj islamano”.

## Fina ceremonio de jaro Zamenhof en UNESKO la 11an de decembro

**31 oktobro 2017.** Por fini la Zamenhofan jaron, la pola delegacio ĉe UNESKO invitas al kunveno lunde la 11an de decembro, je la 9.30, salono XI. La ĝenerala temo estas “Tutmondiĝo, Reto, Kuriero de UNESKO: Kie staras Esperanto cent jarojn post la morto de sia

iniciatinto?” Post bonveniga kafo, salutos Krystyna Zurek, ambasadorino de Pollando, kaj Maryse Wanda Zaleski-Zamenhof, pranepino de la aŭtoro de Esperanto. Poste intervenos Sébastien Moret, doktoriĝanto ĉe la universitatoj de Genevo kaj Tallinn, pri “Kial Esperanto venkis ?”; Jean-Claude Lescure, historiisto, pri “Esperanto fronte al tutmondiĝo” kaj Guilherme Fians, el Brazilo doktoriĝanto ĉe la Universitato de Manĉestro, pri “Esperanto nun kaj fronte al sia estonto: unu komunumo kaj ties komunikiloj”. Post paŭzeto, Chuck Smith, lanĉinto de la Esperanto-versio de Duolingo kaj de Amikumu, prelegos pri “La modernaj komunikiloj je la servo de Esperanto”; Trezoro Huang Yinbao, prezidanto de ĉina fondajo, pri “Kuriero de UNESKO en Esperanto”; Giorgio Novello, ambasadoro de Italio en Norvegio kaj Islando pri “Ĉu nova lingvo por UNESKO?” Sekvos koktelo. La prezentoj estos ĉu en la franca ĉu en Esperanto kun samtempa interpretado. Por ĉeesti, nepras enskribiĝi ĉe <https://esperanto-france.org/annee-zamenhof>.

*Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:*

*777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.*

*212-687-7041*

[www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org)

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041